



# Norvega Esperantisto

ESP ER AN TO B LA D E T

N-ro 5  
1972

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO  
ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-a periodo  
38-a (43-a) jaro  
Monata

## La 57-a U.K. en Portland

### I

Mi partoprenis la kongreson, kiu okazis 28.7.—5.8. kaj la postkongreson en San Francisko 6.8.—13.8. Ambaŭ estis tre sukcesaj, se ne kiel propagandaj manifestacioj ĉe la Amerika publiko, tamen kiel festaj tagoj kaj serioza laborado por kaj de la partoprenantaj gesamideanoj el 40 landoj.

Aliĝis ĉ. 1000 esperantistoj, sed ĉeestis nur ĉ. 900. La duono de la ĉeestantoj estis usonanoj, plie iom pli ol 100 kanadanoj, ĉ. 125 japanoj kaj apenaŭ 300 el aliaj nacioj, ĉefe britoj, francoj, germanoj, italoj, nederlandanoj kaj svedoj. El Norvegujo 7 — 3 sinjorinoj kaj 4 sinjoroj. El ili 3 estis el Haugesund (s-no *K. Dahl*, s-oj *Rønnevig* kaj *Thormodsen*), 2 el Oslo (f-no *Kaŭakami*, s-o *Bugge-Paŭlsen*), 1 el Trondhejmo (s-no *S. Jørgensen*), 1 el Odda (s-o *Reisæther*).

En Portland preskaŭ ĉiuj kongresanoj loĝis en la kongresejo, la hotelo Hilton — 25 etaĝoj —, kelkaj en tre proksimaj hoteloj. La hotelo Hilton entenis ĉiujn kongresajn salonojn kaj halojn, oficejojn ktp. krom restoracioj(n), «baroj(n)». Tiu aranĝo estis granda faciligo por la kongresanoj, kiuj ŝparis la longajn vojaĝojn

inter loĝejoj kaj kongresejoj aŭ al aliaj domoj en grandurbo kie okazu parto de la kongresa programo, kiel estis kutimo en antaŭaj universalaj kongresoj, ekz. en Vieno antaŭ 2 jaroj. En Portland krom la diservoj nur la teatra vespero estis en alia ejo. La hotelo estis tre moderna kaj komforta, kaj ĉiuj teknikaj helpiloj funkciis bonorde.

Tiu koncentrigo kune kun la modera nombro da kongresanoj kreis inter ili pli intiman kaj amikan atmosferon ol kutime. La tuta semajno estis kvazaŭ longa interkona kunveno. La kongreskomitato kaj ĉiuj helpantoj faris ĉion por kontentigi kaj helpi la gastojn venintajn el ĉiuj foraj anguloj de la mondo, la bonvenigo estis vere palpebla. Multaj estis invitataj en privatajn domojn aŭ en restoraciojn. La servado ĉe la ĝiĉetoj funkciis modele de frua mateno ĝis la 18.00 h. Oni komprenis ke la prepara laboro estis estinta grandega — sub taŭga gvidado.

La kontakto kun la publiko estis malgranda. Esperantaj flagoj kaj propagandaj sloganoj aŭ afiŝoj ne estis videblaj en Portland. Evidente la usona movado pli koncentras sin pri la studenta kaj

## La Diamanto

Por ekzerco kaj studo:

En Sud-Afriko oni trovas la plej grandajn diamantojn. En la jaro 1905 oni trovis tiun, kiun oni nomis Cullingham-diamanto. Ĝi pezis 3106 karatojn, t.e. 621,5 gramoj. La registaro de Transvalo donacis ĝin al la brita reĝo Edvardo VII. Oni tranĉis ĝin, tiel ke el ĝi fariĝis unu brilanto 516-karata, unu 309-karata kaj multaj aliaj pli malgrandaj. La du plej grandaj nun ornamas la sceptron kaj la kronon de la brita reĝo.

I første avsnitt av beretningen om diamanten (nr. 3/1972) ble det lovet at vi skulle komme tilbake til fenomenet «oni konsideris ĝin juvelŝtono» eller «oni konsideris ĝin juvelŝtono». For å gjøre det klarere, velger vi først et annet eksempel: «La klubo elektis lin kiel prezidanton» hvor *prezidanton* står til *lin* og følgelig må ha akkusativs-n. Hvis vi vil si at han, formannen, valgte noe, f. eks. medarbeidere, som, altså i *egenskap av formann*, vil *prezidanto* stå til *li* — og altså ikke få akkusativs-n —: «Li elektis kunlaborantojn kiel prezidanto».

Imidlertid har vi også et fenomen som i gramatikken kalles objektspredikatsord, og som vi på norsk treffer f. eks. etter verbet å kalle: «Jeg kalte ham Petter.» I dette eksemplet er Petter objektspredikatsord. På Esperanto står objektspredikatsord ikke i akkusativ: «Mi nomis lin Petro» (*uten -n!*) I teksten ovenfor: «kiun oni nomis Cullingham-diamanto». På Esperanto får man objektspredikatsord til flere verb enn på norsk, f. eks. elekti — derfor: oni elektis lin prezidanto (som jo i realiteten betyr at man kalte ham prezidanto!)

A *veie* heter pezi eller pesi; vi har altså to forskjellige ord for vårt ene. *Pesi* er å måle en tings eller en persons vekt: «Oni pesis la diamanton.» *Pezi* er å ha en viss vekt (pga. jordens tiltrekningskraft). Selv om dette verbet er intransitivt, altså ikke kan ta objekt, må det konstrueres med akkusativ, men denne akkusativen er uttrykk for et mål, og målsledd står jo i akkusativ (har -n) på Esperanto: «la diamanto pezis 3106 karatojn.»

Ak III

La 57-a U.K. - - Daŭr de p. 65

universitata medio. Kunveno de universitatanoj (kiun mi ĉestis) kolektis plenan mezgrandan salonon — el kiuj plurajn nesesperantistojn — kaj la eldiroj montris grandan optimismon kaj celkonscion. Prezidis la kunvenon prof. *Richard Wood*, brito, kiu same kiel *William Auld* nun instruas Esperanton ĉe usona universitato. S-o Auld en la lastaj 3 jaroj estis ripetite invitata al Usono por gvidi oficialajn Esperanto-kursojn ĉe la Stata Kolegio de San Francisko. Mi montras al lia artikolo en «Heroldo» 1.10.1971: «*La dormanto vekigās*» pri la kreskanta intereso por Esperanto en universitataj rondoj en Usono. — Oni raportis pri almenaŭ 10 gravaj universitatoj kiuj lastatempe aŭ havis aŭ baldaŭ havos instruadon de Esperanto. Aliaj usonanoj kiuj grave agadis por atingi tiujn promesplenajn rezultojn estas la konata lingvisto *Mario Pei* (kiu bedaŭrinde ne partoprenis la kongreson), *William Solcbacher*, *Mark Starr*, *John Lewine*, ges-oj *Schulze*, kune kun ELNA mem (Esperanto-Ligo de Norda Ameriko), kies prezidanto estas s-o *Francis Helmut*. Daŭr. p. 67

## Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach, Hans Amund Rosbach.

Adreso de la redakcio: Hulderveien 17 B, N-1700 Sarpsborg. — (Limdato por manuskriptoj: la 20. en la monato antaŭ la apero.)

Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 12,—.

Anonprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,—,  
1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 40,—,  
1/8 p. kr. 20,—.

## Denove pri la klubraportoj

En ĉi tiu numero ni intencas presigi la restantaj klubraportojn ricevitajn. Tio signifas, ke Norvega Kroniko nun bezonas regulajn raportojn, por ke ni povu prezenti la okazaĵojn iomete freŝaj.

Estas fakto, ke la klubraportoj estas ŝatata legaĵo, ne nur ĉar ili raportas pri la faroj de ni mem kaj de niaj konatoj, sed ankaŭ ĉar ili povas doni inspiron al aliaj kluboj pri programeroj ĝis nun ne provitaj. Tial ni presigis eĉ iom malnovajn raportojn, esperante do, ke de nun la raportoj estu ĉiam freŝaj. Tio ankaŭ signifas, ke la ĝis nun ne raportintaj kluboj estas petataj informi pri siaj faroj.

Daŭr de p. 66

Komence de la kongreso mi vidis frontpaĝon de «New York Times» kun preparolo kaj bildoj de la kongreso.

En la citita artikolo lastjara s-o Auld skribis pri la proksimiĝanta 57-a: «Mi antaŭdiras — sen grandaj riskoj — ke tiu kongreso estos unu el la plej stimulaĵoj kaj viglaj, kaj eble havos signifon tute apartan en la historio de nia afero.» — Mi konsentas kun li pri la senpera impreso de vizitanto. Ni esperu ke li pravos ankaŭ pri ĝia signifo. Bona signo almenaŭ estas ke la jarlibro 1972 sub «Usono» enhavas 20 paĝojn da *delegitoj* en 111 lokoj.

ROBOPO

## LA KONTORFONDAĴO

Pli frue .....	kr. 997,00
Olaf Mæland .....	» 25,00
C. S. B. ....	» 20,00
H. Danielsen .....	» 20,00

kr. 1 062,00

Sinceran dankon al ĉiuj donacintoj!

## Usono el Anglujo

Demando al la saĝa Hipopotamo:

Estas evidente, ke Anglujo ricevis sian nomon pro la anguloj; tion oni tuj komprenas, rigardante la landkarton. Do origine la lando estis Anglujo. Nun mi miras, kie estas la sono U, kiu malaperis el la nomo.

Angelo

Respondo:

Kiam homoj el tiu lando vojaĝis al Ameriko, ili kunportis tiun vokalon. Tial nun estas granda Usono en Ameriko.

Hipopotamo

## Sciigoj de N.E.L.

*Kotizoj por 1973.* Por eviti interrompon en la liverado de Norvega Esperantisto estas grave ke ĉiuj membroj pagas sian kotizon frue. Klubanoj bonvolu pagi al la kluba kasisto, rektaj membroj al N.E.L., prefere jam antaŭ Kristnasko.

*U.E.A.-kotizoj 1973.* Por eviti interrompon en la ricevado de la Jarlibro kaj de la gazeto «Esperanto» ĉiuj Individuaj Membroj de U.E.A. devas nun laŭeble baldaŭ pagi sian kotizon por 1973. Pagu al la loka Delegito aŭ rekte al la Ĉefdelegito por Norvegujo, s.ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a, Oslo 6, postĝirokonto 133 29. Ni rekomendas al ĉiuj membroj aboni la Jarlibron kaj la gazeton de U.E.A. La kotizoj por 1973 estas neŝanĝitaj: Membro-Jarlibro kr. 30,00, Membro-Abonanto (ricevas la Jarlibron kaj la gazeton «Esperanto») kr. 60,00, Membro-Subtenanto (ankaŭ ricevas la Jarlibron kaj la gazeton) kr. 90,00.

*58a Universala Kongreso de Esperanto* okazos en Beograd, Jugoslavio, somere 1973. Aliĝiloj estas riceveblaj de Turisma Servo de N.E.L., Boks 942, Oslo 1. Oni planas komunan vojaĝon per aŭtobuso. Ĉiuj interesigantoj estas petataj anonci sin al la Turisma Servo, por ke oni havu ideon pri la intereso por la kongreso inter norvegaj esperantistoj.

*La Oficeja Fondaĵo.* La Liga Estraro kore dankas al ĉiuj bonkoraj donacintoj por ti u grava fondaĵo. Sed ni daŭre bezonas pliajn donacojn por teni la oficejon. Ĉiuj donacoj estas bonvenaj, ĉu grandaj, ĉu malgrandaj.

*Taskotabelo por kluboj.* — *Novembro:* La estraro sendas registritan informon al ĉiuj membroj, kiuj ne ekŝiĝis laŭ la statuto, sed de kiuj tamen revenis la poŝta enkasigilo sen pago, ke oni nun forstrekos ilin kiel klubanojn. La estraro admonas la klubanojn pagi la kotizon por la venonta jaro. La Delegito de U.E.A. kolektas la U.E.A.-kotizojn por la venonta jaro kaj varbas novajn Individuajn Membrojn de U.E.A. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato.

*Raporto de la Liga Estraro pri la 3a jarĉvarono.* Okazis unu estrarkunveno kaj oni sendis unu cirkuleron. R. Bugge-Paulsen reprezentis la Norvegan Registaron kaj N.E.L.-n ĉe la Universala Kongreso en Portland. Oni decidis proponi broŝurojn al la kluboj por produktokosto. La presado de la reviziita koresponda kurso kaj de la «malŝlosilo» bone progresas.

## La reĝo-kobro malsatostrikas en mallibereco kaj estas perforte manĝigata

Tri viroj eniras la dekradaĵon, transiras la akvofosaĵon kaj iras kontraŭ la kaĝoj kie la reĝo-kobroj kuŝas. Unu el la pordoj estas malfermata, kaj tuj la kobro levas la kapon kaj elrampas. Ĝi serpentumas malsupren sur la cemento-peronon. Estas

granda ekzemplero, unu el la plej grandaj, longa pli ol kvar metrojn.

Unu el la tri aŭdaciaj viroj alproksimiĝas al ĝi de malantaŭe, ĝin ekprenas kun fulma rapideco je la vosto, kiun li suprenlevas per ambaŭ manoj. La kobro daŭre serpentumas, sed ne plu povas sin movi antaŭen. La kapo estas alte levita, la faŭko malfermita, la lango elstaras.

La alia viro singardeme alproksimiĝas al la grandega serpento, paŝon post paŝo. Li venas danĝere proksime, koncentrigas sian atenton komplete je tio, kio nun estas okazonta, atente rigardante la kapmovojn de la serpento per akra rigardo. Kaj jen, en distanco de braklongo li sin malsuprenklinas, movas sian maldekstran brakon malrapide kurbe kontraŭ la kapo de la serpento, kaj preskaŭ pli rapide ol kiom oni kapablas tion observi, li permane ekprenas ĝin de malantaŭe kaj tenas la kapon per firma kaj sekura preno.

La tria el la aktoroj, la kuracisto, fiksas pecon de viando sur longa pinĉilo kaj enigis ĝin en la larĝe malfermitan faŭkon de la serpento. Du-tri porcioj, ne precipe grandaj, kaj la manĝo estas finita — la serpento estas perforte manĝigata.

Jen ĝi estas banota en la akvofosaĵo. Denove oni devas sin gardi, la du kiuj tenas la serpenton, kunlaboras kun la plej granda precizeco. Ili serĉas oportunan pozicion, kaj jen per rapida ĵeto la kobro estas enakviginta. La reĝo-kobro tuj eknaĝas, daŭre kun la kapo alte levita — estas kvazaŭ fiero pozo super ĝi.

Jen estas la vico de la poŝta kaj la tria serpento, la procedo estas la sama — t.e., el la lasta serpento oni ankaŭ devas eltiri venenon. Per premo kontraŭ

la venenaj vezikoj super ambaŭ okuloj la veneno estas elpremata, la kuracisto staras preta kun malgranda pelveto kaj ricevas la terure venenan fluidaĵon, la plej danĝeran el ĉiu serpenta veneno, sufiĉe por mortigi ĉirkaŭ kvindek milojn da musoj aŭ mil kuniklojn. Sed ĉi tie ĝi estas uzota por tute aliaj celoj, ĝi fariĝos serumo, kiu venos helpe al homoj morditaj de serpentoj en la ĝangalo.

La kuracisto rakontas, ke laŭnature la serpento ne estas atakema kaj ekatakos nur, kiam ĝi sin sentas minacata. La serpentoj vidas pli bone nokte ol tage, tial oni ordinare ne ekvidas ilin en la ĝangalaj regionoj tage. Ili ne havas eksteran oreilon, kaj pro tio ili estas surdaj. Ili tamen perceptas tre bone piedpaŝojn per vibroj en la tero, kaj sin tuj gardos.

La reĝo-kobro estas la plej venena serpento, kiu ekzistas.

— Kaj kial la perforta manĝigo?

La kuracisto klarigas, ke tiu ĉi serpento estas serpentmanĝanto, kaj en mallibereco ili ne prenas alian nutraĵon per si mem. Tial ili devas esti perforte manĝigataj. Post kiam oni eltiris la venenon, oni donas al ili lakton, por ke ili estu neagemaj.

La plejmulto da serpentoj demetas ovojn, unu kobro povas demeti 20—30 ovojn, kaj la elkovado daŭras de 40 ĝis 136 tagojn. En mallibereco tamen neniu elkovado okazas.

## 70-jara

La 3an de Novembro fidela, serioza esperantistino de pli ol 40 jaroj, Else Bugge-Paulsen, pasos la mejloŝtonon 70-jaran. Dum jaroj ŝi estis kasistino de N.E.L. kaj de Klubo Esperantista en

Oslo, kaj ŝi estas la disponanto de Eldonejo Esperanto de la fondiĝo ĝis nun. Multnombrajn Esperanto-presaĵojn ŝi prizorgas en sia granda, moderna presejo Aas & Wahl, kaj la esperantistojn en Oslo ŝi regule ĝojigas per invitoj al sia bela somera domo apud la Tyrifjordo. Ĝiaj multaj geamikoj sendas al ŝi siajn sincerajn bondezirojn kaj gratulojn.

C.S.B.

### Someraj aranĝoj

*Mondfestivalo de MFDJ en GDR — Berlino 1973*

Sekvontjare MFDJ organizos mondan junularan festivalon en la ĉefurbo de GDR. La preparlaborojn partoprenas ankaŭ la vicprezidanto de TEJO Hans Eichhorn. Dum la festivalo estos 200 lokoj rezervitaj en Potsdam por TEJO-anoj. Estos organizita komuna vojaĝado el Sarajevo al Potsdamo.

Dum la festivalo junaj esperantistoj partoprenos parte ankaŭ la oficialan programon de la festivalo, sed ili havos ankaŭ apartajn speciale esperantistajn programerojn ankaŭ.

Interesantoj: bv turni sin al d-ro Hans Eichhorn, Rosenfelderstrasse 2 A, DDR-Berlin. GDR.

*Esperanto-aranĝoj dum julio en Hungario*

Ĉi-somere la internaciaj renkontiĝoj sekvis unu la alian en Hungario.

La 10-a Internacia Somera Universitato je la komenco de julio havis la saman sukceson kiel en la pasintaj jaroj. Poste komenciĝis en Budapeŝto la Hungara Kulturfestivalo. Pri ĉi-aranĝo plurfoje raportis la hungaraj radiostacioj, la televido kaj menciis ĝin preskaŭ ĉiuj ĵurnaloj, gazetoj. Dum la Festivalo kunsidis la Mondpaca Esperanto-Movado kaj la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.

## ORDLISTE NORSK—ESPERANTO

MALSLOSILO NORVEGA

av

*R. Bugge-Paulsen*

er kommet.

LOMMEFORMAT — 62 SIDER — 400 OPPSLAGSORD

Innhold, foruten selve ordlisten,  
noen internasjonale ord og navn på land og folk.

Pris kr. 7,50 pluss porto

ESPERANTOFORLAGET A/S

Boks 942 — Oslo 1 — Postgiro 100 31

*Poemoj de Lina Gabrielli*

### Almenaŭ dek jaroj

Ha, se mi povus  
forgesi mian aĝon!  
Almenaŭ  
dek jarojn malpli  
mi volus havi.  
Tiel  
plenanime mi  
ridus  
ludas  
kantus.  
Ho, jes, mi sentas  
min infana!  
Se mi forgesas,  
mi ridas  
ludas  
kantus  
malavara.  
Sed se mi konscias  
pri la jaroj miaj,  
mi ne kapblas  
plu ridi  
ludi  
kanti,  
kaj premas koron  
malespero nigra.  
Ha, se mi gajnus  
almenaŭ  
dek jarojn!  
Alvdal, 29.8.71

### En mi ĝermis io

Sendube en mi  
ĝermis io,  
nur ke mi estis  
blinda  
kaj ne konsciis.  
Nun  
mi elfosas  
pere de ci  
alian mondon.  
Deziroj  
sentoj  
pensoj  
kantus en mi.  
Ne gravas  
ĉu kostas pekon  
tiu malkovro  
mia.  
Ĉu vere estas peko?  
Alvdal, 25.8.71

### Mi ne scias

Mi ne scias  
ĉu veriĝos  
sonĝo de mia  
amo.  
Rigardas mi  
kun fido  
al la plej bona  
sorto.  
Mi kantus,  
kara!  
Majo, 1972



## UNESKO-novajoj

### DEKA TUTMONDA NIGRA FESTIVALO DE ARTOJ KAJ KULTUROJ EN 1974

Oni decidis okazigi la duan tutmondan nigran festivalon de Artoj kaj Kulturoj en oktobro 1974 en Lagos, Nigerio. La unumonata festivalo inkluzivos skulptarton, pentroarton, tradiciajn metiojn, muzikon, dancadon, teatraĵojn, kinon, literaturon kaj modojn, laŭ la nigeria Ministerio pri Informado kaj Laboro, Ĉefo Anthony Enahoro, la prezidanto de la internacia komitato de la festivalo, kaj la festivala ĝenerala sekretario, S-ro Alioane Diop. Ambiciaj planoj por la okazaĵo inkluzivas konstruon de satelita urbo proksime al Lagos kun teatro por ĝis 100 000 homoj. Ĉefo Enahoro diris, ke la festivalo celas doni al la nigra homo fieron pri lia pasinteco kaj liaj kulturaj atingoj. «Gravas al aliaj rasoj, ke iliaj nigraj fratoj havu mem-estimon, kaj egale gravas al la sukceso de aliaj kulturoj, ke la afrika heredaĵo plene realiĝu.

### PROFILO DE IDEALA BIBLIOTEKO

Por helpi la landojn kaj la instancojn, kiuj deziras entrepreni programojn de traduko, Unesko ĵus eldonis liston de ĉirkaŭ 1500 verkoj — romanoj, rakontoj, poemoj, teatraĵoj, k.t.p. — kiujn oni opinias tipaj de la universala literaturo. Ĉi tiun skizon de «ideala biblioteko» (la aŭtoroj substrekas ĝian karakteron nekompletan kaj provizoran) oni establis per la kunlaboro de konsilio pri filozofio kaj pri homaj sciencoj de la naciaj komisionoj por Unesco en diversaj landoj. Li listo komenciĝas per verkoj en la

lingvoj antikvaj kaj klasikaj, sed en ĝi la nuntempaj aŭtoroj plenigas la plej grandan spacon. Oni klasifis ilin, ne laŭ landoj sed laŭ la lingvoj, en kiuj ili verkas. La listo mencias 95 lingvojn.

### EN USONO OFICIALA HELPO POR DULINGVA INSTRUADO

La Usona Ministerio pri Sano, Eduko kaj Bonfarto asignis \$ 2 700 000 por helpi en 15 ŝtatoj novajn programojn celantajn la provizon de eduko dulingva en la angla kaj la hispana, franca, portugala, ĉina, rusa aŭ unu el 13 indianaj lingvoj. La programoj profitigos precipe infanojn el malriĉaj familioj, kie la hejma lingvo ne estas la angla.

### INTERNACIA JARO DE LA LIBRO

Ĉiun sekundon kiu preterflugas, la presiloj de la mondo produktas 260 librojn kaj 4500 ĵurnalojn; ĉiuj minuton oni eldonas unu libron tute novan. Pli ol 500 000 titoloj en 8 milionoj da ekzempleroj estas eldonataj ĉiuj jaron; kaj metitaj flankon ĉe flanko kaj kovrilon ĉe kovrilo, la libroj eldonitaj en unu jaro farus por la mondo trioblan zonan!

«Ĉiun minuton oni presas en Sovetunio ĉirkaŭ 3 000 librojn.»

Tion diris ĝia Ambasadoro en Francujo okaze de la malfermo de ekspozicio «La Eldonado kaj la Bibliotekoj en Sovetunio» en la domo de Unesko en Parizo. Fakte, en tiu lando oni eldonas librojn en 145 lingvoj: 89 lingvoj parolataj en la lando kaj 56 lingvoj eksterlandaj.

(Unesco Features kaj Informa Servo de UEA)

## 👉 På Norsk 👈

### INTERNASJONALT UNIVERSITET

I sommer ble det i Liège, Belgia, grunnlagt et internasjonalt universitet uten språkdiskriminering, idet administrasjon og all undervisning foregår på det internasjonale språket Esperanto. Den nye institusjon ble åpnet av den kjente belgiske pedagog professor Ernest Natalis, som tok sitt utgangspunkt i den store humanist Jan Komensky, en av de første forkjempere for et nøytralt universalspråk, og han understreket videre at tusener av verdifulle verker går tapt for de fleste på grunn av språkvanskeligheter og mangel på oversettelser.

Universitetet i Liège hadde stillet sine bygninger til disposisjon. Det var foreløbig bare to fakulteter, medicin og språkvitenskap. Det meldte seg 70 studenter fra 11 land. Forelesninger og kurser ble holdt av universitetslærere fra 8 land, blant dem var dr. C. Stejneger fra Universitetet i Oslo. Det er meningen fra neste år å utvide med flere fakulteter.

### SPRÅKENE I MÜNCHEN

Ifølge statistikken var det i olympiabyn 13 909 idrettsfolk og funksjonærer som deltok i De olympiske leker. Av dem var det 2 156 med engelsk som morsmål, 1 659 med tysk som morsmål, 1 579 med spansk, 628 med russisk, 578

med fransk, 482 med polsk, 450 med italiensk, 381 med nederlandsk og 312 med arabisk som morsmål. Dessuten noen tusen som representerte forskjellige andre språk. — Her skulle det vel være behov for et internasjonalt språk som Esperanto?

### TITO SOM BESKYTTER FOR ESPERANTOKONGRESS

Jugoslavias president Tito har tatt imot invitasjonen til å stå som beskytter for den store verdenskongress for Esperanto som skal finne sted i Beograd i august 1973. Tito har tidligere lært seg det internasjonale språket, og det er nylig utkommet en biografi om ham på Esperanto i Jugoslavia.

### NORSK PREST MED ESPERANTO-BOK

Sogneprest i Kristiansund Hans Amund Rosbach har nettopp gitt ut en bok på det internasjonale språket Esperanto. Boken har titelen «El propra kaj fremda» (Fra egen og andres (produksjon)) og inneholder ting Rosbach selv har skrevet originalt på Esperanto, såvel som oversettelser fra norsk til det internasjonale språket. Blant diktere som er oversatt, finner vi Obstfelder, Bjørnson, Ibsen, Sivle, Elster, Ingeborg Refling Hagen og flere. Sognepresten har tidligere utgitt bl.a. en salmebok med salmer på Esperanto til bruk ved internasjonale gudstjenester.

## INTERNACIA UNIVERSITATO

### SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ 1972, LIEGO

Antaŭ kelkaj monatoj oni povis en la gazetoj legi pri la malfermo de «Eŭropa universitato» en Firenze. La institucion starigis la 6 landoj de la E.E.K., kun

aprobo de la tiamaj 4 kandidat-landoj. Ĝia celo estas «internacia kunlaboro de granda signifo.»

Laŭ la reguloj la studentoj devas kapabli sekvi la kursojn en minimume du el la kvin oficialaj lingvoj de la universitato: itala, franca, germana, angla, nederlanda. Nur la dana kaj la norvega ne troviĝis sur la listo.

Sed dum la somero 1972 ekĝermis ankaŭ vere internacia universitato sen lingva diskriminado. La 31an de Julio malfermiĝis en Lieĝo, Belgujo, la unuaj «Someraĵaj Universitataj Kursoj», kie administrado kaj instruado okazas nur en la internacia lingvo Esperanto. Eĉ se la komenco estis modesta, kun nur du fakultatoj, lingvistiko kaj medicino, estis grava unua paŝo sur la vojo al vere universala esplorado kaj universitata edukado.

La novan institucion malfermis la konata belga pedagogo profesoro Ernest Natalis de la universitato de Lieĝo. Prof. Natalis montris al la granda humanisto Jan Komensky (Comenius), unu el la unuaj pledantoj por neŭtrala universala lingvo. Lian ideon efektivigis Zamenhof, fondante Esperanton, kaj kiam profesoroj kaj studentoj nun utiligas Esperanton, ili plenumas la postulojn de Komensky pri empiria esplorado: en difinita punkto la ago superos la vorton, kaj oni devas eksperimenti.

Prof. Natalis plie substrekis ke miloj da valoraj verkoj kvazaŭ perdiĝas por la plimulto pro la lingvaj diversecoj kaj manko de tradukoj. Fine li varme dankis al la universitato de Lieĝo per ĝia rektoro M. Welsch kaj estinta rektoro M.

Dubuisson, kiuj disponigis la universitatajn konstruaĵojn por la nova iniciato, kaj la multajn eminentulojn en la patrona komitato, inter kiuj estis la prezidanto de la belga Senato, P. Struye, kaj la prezidanto de la belga ĉambro de deputitoj, A. Van Acker.

Al la unua sesio de la nova universitato anonciĝis proks. 70 gestudentoj el 15 landoj, kaj prelegojn kaj kursojn faris universitataj instruistoj el 8 landoj. Personoj mi havis la plezuron prelegi pri Bazaj nocioj de biologio por medicinistoj, kaj mi havis fervoran aŭskultantaron el 7 landoj. 3 el ili ankaŭ prezentis sin por ekzameno post la fino de la kurso.

Ĉi tiu unua sesio ampleksis 4 semajnojn. Ĉiu semajno formis apartan tutajon, kaj ĉiu studento povis aliĝi por 1, 2, 3 aŭ 4 semajnoj. Diversaj instancoj kaj personoj afable disponigis stipendiojn por studentoj, kio ebligis la partoprenon al multaj, kiuj alie malfacile povus aliĝi.

La universitato estas nova kaj moderna. Ĝi situas en bela parko iom ekster la urbo Lieĝo, kaj estis tre konvena.


La bonaj spertoj rikoltitaj dum tiu ĉi unua sesio bone aŭguras por daŭrigo dum la jaroj venontaj, kiam oni ankaŭ esperas plivastigi per aliaj fakultatoj. Se tiu ĉi kuraĝa iniciato ricevos la subtenon, kiun ĝi meritas, ĝi sendube povos evolui al vera neŭtrala internacia universitato.

C. Stop-Bowitz.

## FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA  
ESPERANTISTA FERVOJISTA  
ASOCIO — NEFA

Kaldbakkstubbën 22, Oslo 9  
Redaktoro: Odd Kolbrek,



## LA AŬSTRIA FERVOJMUZEO

Tiu muzeo situas en la ejoj de la granda teknika muzeo por Aŭstrio. Ĉe la enirejo grandaj ilustraĵoj montras la evoluon en la fervojkonstruado en Eŭropo kaj en transoceanaj landoj.

Inter la lokomotivmodeloj estu menciata modelo de la maŝino de Richard Trevitchik: «Locomotion», plue de unucilindra lokomotivo kun grandega incerado funkciigita pere de dentrado kontraŭ dentstango iranta sur reloj faritaj de angulfero, kaj de «Puffing Billy» — la unua lokomotivo kun glataj radoj, uzata de 1813 ĝis 1826 (la originalo troviĝas en la Kensingtonmuzeo en Londono). Tre interesa estas la ekspozicio «La fervojo en la muziko», kompreneble kun la nomo Strauss ofte videbla, tre tipa vor Vieno kun ĝiaj riĉaj muziktradicioj. Aŭstrio ja estas montarlando, sekve estas sekcio por tunel- kaj pontkonstruado. En la muzeo estas granda aro da fotoj pri gravaj momentoj, kiam fervojoj solene inaŭguriĝis, dum imperiestro Franz Josef ĉeestis. Kaj, tipe por la nuntempo, aliaj fotoj rakontas pri la sorto de la samaj fervojoj. Nun la trafiko laŭ ili ĉesiĝas, ĉar la aŭtotrafiko laŭ la ŝosejoj konkeris ilin.

Inter la modeloj de stacidomoj kaj de aliaj fervojaj konstruaĵoj troviĝas vera kariozaĵo, nome modelo pri relgardist-

domo, kiu tute estas enkonstruita en kaĝo de krabarilo por protekti la enloĝantojn kontraŭ malario.

En la vagon- kaj lokomotivhalo estas specialkonstruaĵoj pro la kruta montar-tereno: dentradfervojoj, kablofervojoj k.t.p. — precipe de Suda Tirolo.

Speciala sekcio montras la evoluadon de hejtigsistemoj kaj de la lumigado en la pasaĝervagonoj. Tiu, kiuj ŝatas studi la evoluadon de konstrumaniere de person- kaj bremsvagonoj, havas unikan ŝancon en tiu halo. La unua fervojo en la eŭropa kontinento malfermiĝis en 1825 inter Linz kaj Budejovice. Ek-de la komenco ĝi estis ĉevalfervojoj, kaj de tiu fervojo estas konservita la stranga pasaĝervagono «Hannibal», kiu konstruiĝis kiel poŝtdiligenco por ŝosetrafiko. En ambaŭ ĝiaj finoj estas droŝkistseĝoj. Kiam ĝi fariĝis fervojvagono, ĝi ekipiĝis per flangradoj, kaj de 1814 ĝis 15/12 1872 ĝi estis dua-klasa pasaĝervagono. Je la lastmenciata dato la trafiko laŭ la linio ĉesiĝis. Ankaŭ tre stranga inspektovagono troviĝas de tiu fervojo.

En la signalhalo estas amuza ilustraĵo pri la signifo de optikaj signaloj de la jaro 1855 kun klariga teksto en la lingvoj: germana, ĉeĥa kaj hungara.

## TEJO KONGRESIS

En la ĉarma pola urbo Torun, okazis ĉi-jare la Kongreso de TEJO. El 26 landoj partoprenis pli ol 200 junaj esperantistoj. Kun plezuro oni tuj povis konstati, ke la lingva nivelo de la partoprenintoj estis pli alta ol iam ajn, kaj preskaŭ tute mankis krokodiloj.

Dum la Kongreso okazis tri seminarioj. Ankoraŭ en Edinburgo la Komitato de TEJO decidis okazigi seminarion pri la temo: «Junularo kaj la 3-a Mondo». En la kadro de ĉi tiu temo la partoprenantoj povis aŭskulti interesajn enkondukprelegojn kaj ĝui interesajn diskutojn pri la temo. Bedaŭrinde mankis prelegantoj el la 3-a Mondo.

La dua seminario temis pri la «Eŭropa sekureco». Tio estas unu el inter la plej gravaj kaj aktualaj problemoj de la nuntempo, tial ĝi vokis grandan intereson, kaj multaj vizitis ĉi tiun aranĝon.

La trian seminarion organizis la lokaj esperantistoj pri la granda pola sciencisto Nikolao Kopernik, kiu naskiĝis antaŭ 500 jaroj en Torun.

Dum IJK kvarfoje kunsidis la Komitato de TEJO kaj pritraktis kelkajn gravajn problemojn. Oni elektis novan Estraron, kies membroj estas: prezidanto: dr Renato Corsetti, Italio, ĝenerala sekretario dr. Flóra Szabó-Gelso, Hungario, kasiso Ian Parker, Skotlando, vicprezidantoj: d-ro Hans Eichhorn, GDR, d-ro Hans Michael Maitzen, FRD, Tomas Jansson, Svedio.

## Recenzoj

EHO

La dana Esperanto-revuo aperas nun en tute nova aspekto kaj formo. Ĝi estas multe pli granda kaj multe pli bela. La papero estas tre bona, la preso kaj la tuta prezentiĝo tre plaĉaj. La redakcio intencas doni ankaŭ distraĵon kaj amuzon, tiel unu tuta paĝo estas dediĉita al «diversaj kuriozaj interesaj» aferoj, alia al la rideto, kaj senkapa nudulino komprenas nur Esperanton.

## ĈINAJ POŝTKARTOJ

Denove la ĉinoj eldonis Esperantajn poŝtkartojn multkolorajn, ĉi-foje eĉ tri seriojn da 12 kartoj. Unu serio pritraktas Jan'an, sanktan lokon de la hina revolucio, alia serio temas pri Ĝinggangŝan, kiu estas la unua kampara revolucia bazloko de la lando, persone fondita de Prezidanto Mao. La tria serio estas dediĉita al historiaj restaĵoj elterigitaj en Ĥinuĵo, kaj ĝi estas vere belega. Ĉiuj tri serioj estas tre bele presitaj en altkvalitaj koloroj, tamen sur tro maldika kartono.

## SENNACIECA REVUO 1972

Ĉiujare Sennacieca Revuo prezentas tre valoran publikacion kun kontribuoj pri sociopolitiko, lingvistiko, historio, ekonomio, geografio. La kosto estas unu dolaro. Eldonejo: SAT, 67 avenue Gambetta, PARIS 20.

## Por infanoj

P. Korte: «Sub la verda standardo.» (Esperantoinstruo al infanoj laŭ la rekta metodo.) Prezo proks. 7.50 kr.

Ĉi tiu lernolibro aŭ laborilo havas jam tradiciojn: estas jen la 7 a eldono. Ĝi estas bona, iras de la simpla al la pli malsimpla,

ĉiu vorto estas ilustrita per klara desegnaĵo, kaj fine troviĝas vortlisto, kun indiko de la paĝnumero en kiu la koncerna vorto aperas unufoje.

Aperos tre baldaŭ dua laborilo, kaj gvidilo por la instruisto. Mi bone povas rekomendi la libron, mi pensas ke ĝi kaptos la intereson de la infanoj. Tamen mi havas kelkajn negativajn kontraŭdirojn: La preso estas parte tre miniatura. Kaj la eksteraĵo estas tro modestaspekta kaj malbelkolora. Venis nun vere la tempo ke la eldonistoj devas pripensi tiun flankon de la afero. Ĉi tiu libro, kaj ankaŭ multaj aliaj esperantaj libroj, estas tiel enuaj kaj malplaĉaj laŭ eksteraĵo ke mi neniam emus aĉeti ilin se mi vidus ilin ĉe librovendisto! Homoj kiuj ne multe scias pri Esperanto, devas pro la aspekto de tia libro pensi ke ĝi reprezentas tre malriĉecan kaj malindan aferon.

Ni devas nun kompreni ke se ni volas ke Esperanto altiru ian atenton, niaj presaĵoj devas aspekti belaj kaj allogaj. Ĉi tiu afero estas tiom grava ke ni ne povas ignori ĝin plu!

Elna Matland.

## KONGRESDATOJ FIKSITAJ

Dum la okuloj de la Esperanto-movado estas ankoraŭ turnitaj al Usono, kie okazos la 57a Universala Kongreso de Esperanto, en Portland, Oregon, la organizantoj de la kongresoj jam devas plani por la postaj jaroj. La Estraro de UEA ĵus elektis kiel kongresurbon por la jaro 1974 la urbon Hamburgo en la norda parto de Federacia Respubliko Germanujo. La datoj estos: de la 27a de julio ĝis la 3a de aŭgusto, 1974. Samtempe la Estraro aprobis la okazigon de Oficiala Poŝtkongreso en Ateno, Grekujo, post la

Universala Kongreso en Beograd, Jugoslavio (datoj de Beograd: 28a de julio ĝis la 4a de aŭgusto, 1973). La kongresurboj por 1975 kaj la postaj jaroj ankoraŭ ne estas elektitaj.

## Norvega Kroniko

## Oslo

## KUNVENO 20.3.72

C. Stop-Bowitz legis el cirkulero de NEL.

Ankoraŭ-foje ni spertis numeron de la kluba gazeto «La Vagabondo», lerte redaktita de Th. Smådahl, enhavo: «Lingva haoso», spritaĵoj.

Thor Magnus Carlsen kiel kutime majstre gvidis divenkonkurson.

J. Berggreen -prezidanto de ekspozicia komisiono- informis pri la ekspozicio «Ferio-Libertempo — 72» okazonta de la 13-a ĝis la 23-a de aprilo, kie nia klubo en kunlaboro kun NEL havos standon pri Esperanto.

## KUNVENO 4/4/72

La prezidanto s-ino Rees deziris bonvenon kaj precipe al g-roj George el Britujo, al ge-roj Krogstie el Loten kaj al s-ino Margrethe Nilsen el Kopenhago.

S-ino Rees rakontis pri Moire kaj Ogwin George, kiujn ŝi, precize antaŭ unu jaro, kune kun sia edzo Clive, vizitis kun la speciala tasko inviti ilin al Norvegujo.

Ge-roj George estis invitataj al Norvegujo por esti prezentitaj en televida programo de Erik Bye 8/4, kaj por vojaĝi al Sylling 9/4.

Post tio s-ro Krogstie prezentis al ni interesajn lumbildojn pri sia vojaĝo al

Maribor en Jugoslavio, kiun li faris en kombino kun stipendio por studi la historion de la rado.

La kunveno okazis en kunlaboro kun la studenta esperanto-grupo, kies prezidanto s-ro Otto Prytz Kore bonvenigis nin kaj donis la vorton al s-ino Rees, kiu referis leteron de ŝi senditan al la Pola radio okaze de la ekspozicio «Ferio-Libertempo 72». Pepita de Caspary aŭdigis sonbendankaptaĵon de la respondo, fare de Pola radio al la menciita letero.

S-ro Storholt montris lumbildojn kaj rakontis pri siaj spertoj dum li kiel ĉasisto restadis en Orienta Groenlando.

Otto Prytz, per sia facila kaj sprita maniero, priparolis la karakterizajn gramatikaĵojn de la Groenlanda lingvo. Li amuzis kaj imponis nin.

#### KLUBKUNVENO LA 15an. 5a. 72a.

La prezidanto s-ino Rees malfermis la kunvenon dezirante koran bonvenon al nia amiko Zelko Takaĉ.

Kiel vortoj por pripensoj C Støp-Bowitz transdonis al nia kara klubano Otto Prytz la diplomon pro la ĵus sukcese plenumita instruista Esperanta ekzameno. S-ro Prytz estas la 5-a persono en Norvegujo kiu ĝis nun havas tiun ekzamenon.

Kial mi uzas ĉi tiun okazon por vortoj por pripensoj, diris C. Støp-Bowitz, estas por instigi vin ĉiujn sekvi la ekzemplon de s-ro Prytz.

C Støp-Bowitz elegante donis al ni lekcion pri eleganta lingvaĵo. Ni ĉiuj tre interese aŭskultis lernis kaj amuziĝis. Laŭ deziro de la aŭskultantaro C Støp-Bowitz promesis reveni al la temo dum venontaj kunvenoj.

S-ro Zelko Takaĉ varme salutis la ge-

klubanojn. Li ĝojis renkonti malnovajn geamikojn.

Li ja konsideras Norvegujon kiel sian duan patrolandon. Li fakte funkcias kiel norvega vickonsulo en Jugoslavio. Pri Norvegujo li prelegis 500 fojojn kaj en TV li havis 501 programhorojn. Li tradukis 3 librojn. Nun li venis ĉar la universitato de Trondhejmo invitis lin prelegi la 19an de majo.

Klubkunveno merkredon la 7.6.72 ĉe la somera dometo de Eva kaj Carl Støp-Bowitz.

Oni malfermis per bona kanto, speciale dediĉita al g-roj Criach, la gepatroj de Pepita de Caspary.

La prezidanto akcentis kiel ĝojaj ni ĉiuj estas pro tio ke Eva kaj Carl ankoraŭfoje volas akcepti nin ĉe si laŭ jam multjara tradicio.

S-ino Antonia Galbany de Criach faris belegan kroĉlaboron kaj ŝi donacis ĝin al la Klubo por lotumado. Pepita promesis kunpreni ĝin al ĉiuj kunvenoj por ke ĉiuj povu vidi kaj admiri ĝin. Annelise tutkore dankis ŝin.

Ankaŭ laŭ tradicio la ekzamenaj diplomoj estis disdonataj de C. Støp-Bowitz; pro elementa ekzameno al:

S-ino Odbjorg Auddhal.

S-ino Marcela Riefling.

Ni ĉiuj estis varme admonitaj pri plenumo de diversgradaj ekzamenoj.

Informoj pri cirkulero de NEL estis donitaj. Sciigo pri nova Esperanto-klubo ĉe Stavanger, 9 membroj, starigita laŭ meminiciato de S-ro Geir Sverre Braut, kiu meminiciate lernis Esperanton. Tiaj sciigoj vere varmigas la koron!

Laŭ instigo de s-ro Criach, oni sendis saluton de la Klubo al la 14a renkontiĝo

de Katalunaj esperantistoj. «Ni sendu salutojn de la Klubo al la 14-a renkontiĝo de Katalunaj esperantistoj. «Ni sendu salutojn por montri ke ni spirite kunĉestas ĉar por ni persone estas la unua fojo dum ĉi 14-jaroj ke ni ne ĉeestos. Dum tiaj renkontiĝoj, kiuj ĉiam okazas en nova loko, ni ĉiam lasas postsignojn, t.e. strato portanta la nomon Esperanto aŭ Zamenhof» daŭrigis nia gasto. Li atentigis pri la graveco de Esperanto en la estonta Eŭropo. Plue li rakontis pri la Esperanto-klubo de Sabadell kiu nun havas 200 membrojn vigle laboras kaj povas gaje rigardi la estonton ĉar multaj junuloj lernas Esp. nun.

Radio Sabadell unufoje posemajne havas programon en kaj pri Esp.: informoj, interparoloj, kurso, gramatikaĵoj. Sabadell estas nuntempe ekzemplo por ĉiuj aliaj kluboj.

«Estas deprima por ni maljunuloj ne vidi junulojn en la kluboj, Feliĉe ŝajnas ke kun la junuloj ekinteresiĝas ankaŭ aliloke.» konkludis nia gasto.

Ĉeestis 16 membroj kaj 2 gastoj.

Libroj vendiĝis por kr. 41.—

Klubkunveno vendredon la 23.6.72 en la dometo de Else Bugge-Paulsen ĉe Tyrifjorden.

Kvankam la vetero estis ne tro meplena ĉeestis 27 membroj kaj 7 gastoj kiuj kune pasigis agrablan Sankta Johanan vesperon en atmosfero de samideana amikeco.

Ne necesas preparoli la gastamecon de nia gastigantino kaj ŝiaj helpantinoj kiuj kiel kutime nin dorloris.

Kvankam apenaŭ troviĝis strando, pro la alta akvo-nivelo de la lago, ni tamen sukcesis bruliĝi fajron dum ni kantadis

akompanataj de Grotmål. Ripozigante niajn gorgojn ni aŭskultadis al la plaĉa kantado de Grotmål.

La tirado de la kluba loterio okazis. Bedaŭrinde ni konstatis ke tia tirado malkonvenas al tia vespero kaj ni ne ripetos ĝin. Ĉar pro la tirado ne okazis la tradiciaj kaj amuzaj skeĉoj prizorgataj de nia kara Bobi.

Niaj gastoj el Hispanujo, g-roj Criach, konstatis ke ni scipovas pasigi agrablan tempon kune. Ili kunprenis multajn impresojn al la Hejmlando.

La loterio havigis al la kluba kaso kr. 657,50.

*Raportis Pepita*

#### Sauda

Klubkunveno ĉe ges. Andersen la 18an de aprilo.

La 22a de marto nia klubo estis 35 jara kaj tiuokaze la prezidantino laŭtegis gratulleteron de Norvega Esperantista Ligo. La Okcidenta distrikto intencas aranĝi kunvenon pentekoste en Ulvik.

J. Matland parolis pri «Et europeisk fellesskap, et felles språk». Li parolis pri la eŭropa konsilantaro, de la fondigo en la jaro 1949 ĝis hodiaŭ. En la komenco oni tie ĉefe pritraktis kulturajn aferojn, sed nun oni inter alie pritraktas ankaŭ ekonomiajn kaj lingvajn. Matland parolis bone, kaj konkludis ke la solvo de la lingvaj problemoj estas enkonduki Esperanton por la komuneco, kiu reprezentas popolonombro de proksimume 300 milionoj.

La lingva duonhoru gvidata de A. Bjerke, iomete ruzospertaj traduktaskoj.

Per ricevita gramofondisko de Cinujo N. Birkeli montris ĉinan operomuzikon de Pekingo.

*Sekr.*



## Korespondu

Multaj komencantaj esperantistoj deziras korespondi: 1) Nikolaj Starodubcev (33-jara klubgvidanto), poŝtrestante, 340047 *Doneck*, Sovet-Unio. 2) Ludmila Butko (17-jara knabino), str. Lysenko 46, 340087 *Doneck*, Sovetunio. 3) Interklubo «Globus» (70 anoj 15—17 jaraj), Mezlernejo N 103, str. Dunajevskogo 1, 340039 *Doneck*, *Sovetunio*. 4) Klubo de Internacia Amikeco (40 anoj, 15—17 jaraj), Mezlernejo N 138, str. Makejevskaja 1, 340031 *Doneck*, *Sovetunio*. 5) Esperanto-grupo (35 anoj 14—17 jaraj), Mezlernejo N 5, str. Naberejnaja, 340015 *Doneck*, *Sovetunio*. 6) Interklubo ĉe instituto Dongipriŝaht (15 anoj, 18—25 jaraj), str. Artjoma 125, 340066 *Doneck*, *Sovetunio*.

44-jaraĝa hemia faklaboristo deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn kun virino en via lando. Helmut Trepte, Strasse des Friedens 36, *Radebeul* 1, D.D.R.

Estonino, 39-jara fraŭlino, inĝenierino pri teknologio en frandaĵfabriko, serĉas norvegajn gekorespondantojn. F.ino Virve Ernits, Mahla 65-1, Tallinn 12, Estonio, U.S.S.R.

Pensiulo, iama prokuristo, volonte korespondus vikle kun samideanoj norvegaj. Ernst Kind, Paul-Gerhardt-Str. 21, DDR-724 *Grimma*, Germana Dem. Resp.

16-jara gimnazianino tre ŝatus korespondi kun norvegaj junuloj. F.ini Suzana Finszter, Nyár u. 3, *Győr*, Hungarujo.

19-jara studentino, komencantino, deziras korespondi kun norvegoj. Mi interesiĝas pri lernado de lingvoj, vojaĝoj, muziko, bona literaturo. F.ino Elzbieta Kulig, ul Kapucynska 3/12, *Kraków*, Polujo.

Mi ŝatus korespondi kun esperantist(in)o aŭ geedza paro. Mi estas edzo kun dujara filineto. Jozefo Rati, Tovonysor 3. lh., IX. em. 1, Székesfehérvár, Hungarujo.

18-jara hungara lernanto volus korespondi kun 17—18-jaraj gelernantoj.

Skribu al: Zoltán Major, Katona József u. l., Székesfehérvár, Hungarujo.

## NORSK ESPERANTO-FORBUND (*Norvega Esperantista Ligo*)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30  
Kontoradresse: General Birchs gate 30, Oslo  
Telefon: 69 14 39  
Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30-16.30  
*Turisma Servo*: Boks 942, Oslo  
Postgiro 100.32

## ESPERANTOFORLAGET A/S (*Eldonejo Esperanto A/S*)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31  
Kontoradresse: General Birchs gate 30, Oslo  
Telefon: 69 14 39

## Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a, Oslo 6. Postgiro 133.29

## La redakcio:

Johan Hammond Rosbach,  
Hulderveien 17 B, N-1700 Sarpsborg.  
Telefona: 54 727

*Ekspedejo de Norvega Esperantisto*:  
Boks 942, Oslo 1.

Trykt hos A. Sæther A.s - 2300 Hamar